

Norvega Esperantista Ligo

Jarraporto 2012

(traktota en la landa kunveno 2013)

(La etliteraj teksteroj estas citaĵoj el la laborplano 2011–2013.)

A. Ekstera informado

Amaskomunikiloj

La estraro prioritatas havigi preparolon pere de la amaskomunikiloj, ekzemple tiel:

- dissendante gazetarajn komunikojn pri novaĵoj
- instigante la klubojn informi lokajn amaskomunikilojn kiam okazas io interesa
- instigante al la membroj verki leterojn de leganto pri debatata afero kiam la cirkonstancoj invitas al mencio de Esperanto

Dum 2012 registriĝis 13 gazetaj intervjuoj, artikoloj, raportaĵoj k.s. kiuj menciis Esperanton aŭ temis pri ĝi, 7 leteroj de legantoj kaj 5 noticoj kaj mallongaĵoj. Aldone registriĝis unu mencio en radio. Multaj el la gazetaj mencioj ŝuldiĝis al kampanjo okaze de la jubilea jaro.

Jubilea grupo

Okaze de la 125-jariĝo de Esperanto grupo de aktivuloj kunordigis siajn fortojn: Douglas Draper, Kristoffer Haug (kun anstataŭanto Leif Arne Storset), Mario Machlik, kun konsilantoj Hilde Dahlberg kaj Judith P. Abrahamsen. La grupo i.a. starigis jubilean retpaĝaron subgvide de Mario Machlik, vidu ankaŭ sube.

Sur la internacia kampo ILEI longe planis 125-partan retkurson pri Esper-

anto okaze de la jubileo. Bedaŭrinde ILEI devis rezigni pri la projekto, sed Hilde Dahlberg starigis 125-tagan norveglingvan kurson pri Esperanto per Twitter, vidu sube.

La jubilea grupo dissendis gazetaran komunikon al ĉ. 170 gazetoj, kio rezultigis multajn menciojn. Ili ankaŭ tradukis kaj pretigis belan, freŝaspektan kaj ampleksan broŝuron.

Interreto

La estraro prioritatas la retpaĝojn de NEL, tiel:

- certigante, ke www.esperanto.no havu redaktoron kiu respondecu pri konstanta ĝisdatigado
- prizorgante, ke informoj pri Esperanto ĝenerale, pri kursoj kaj aktualaj eventoj kaj pri havebla literaturo estu troveblaj rete

Ni uzis nian propran servilon, situantan en la oficejo de Jardar Eggesbø Abrahamsen, kiu respondecis pri ĝi kaj teĥnike kaj enhance. La servilo havas kaj retpaĝojn kaj retpoŝtan sistemon.

Niaj retpaĝoj enhavas ampleksajn informojn pri Esperanto norveglingve, liston de kontaktpersonoj, kaj informojn pri aĉetebla literaturo, aranĝoj ktp. Oni afiŝadas la estrarajn protokolojn de NEL. Krom tio la ĝisdatigoj

estis maloftaj, parte ankaŭ pro manko de novaĵoj.

Tamen la tehniko solvo estas malbona, kaj okaze de la 125-jariĝo de Esperanto la jubilea grupo starigis propran jubilean paĝaron kun informoj, krucvortoj kaj cito de la Twitter-kurso.

NJE havas siajn retpaĝojn en aparta servilo, kie publikiĝis ĉiu numero de *Inter Ni Dirite*. La paĝaro de NEL ligas al la paĝaro de NJE.

- konsiderante ĉu NEL ĉeestu en aktualaj retsocioj

NEL havas la konton @esperantonytt ĉe Twitter, kie aperis manpleno da mesaĝoj dum 2012, tamen plejparte tehnikaj. Aliflanke Hilde Dahlberg en la jubilea grupo starigis Twitter-konton kie aperadis lecionetoj pri Esperanto, vidu sub «Interretaj kursoj» sube.

NEL estas ankaŭ en Facebook (de 2008), sed ne aktivis tie.

- ofertante helpon al aliaj organizoj kiuj deziras krei retpaĝojn en Esperanto

La estraro ne prioritatis tion pro manko de homfortoj.

Informbudo/prelegoj

Ĉiuj informoj estu sobraj kaj precizaj. Por pli bone informi pri Esperanto la estraro konsilu membrojn pri:

- vizitoj en lernejoj kaj organizaĵoj por informi pri Esperanto
- informbudoj kaj disdonado de informiloj surstrate aŭ ĉe foiroj, ekz-e studentaj tagoj, lokaj kulturaj eventoj, internaciaj aranĝoj kaj simile

En Oslo estis tritaga informbudo dum la Mela-festivalo. Aldone Bjørn Øyen havis informbudon en Egertorget en 11 tagoj po 3 horoj. La klubo de Tromsø havis informbudon kaj ekspozicion dum *Internasjonal uke* en junio.

Informado en la norvega

La estraro prioritatis eldoni informojn pri Esperanto en la norvega, ekzemple aktualajn broŝurojn.

En 2012 eldoniĝis la 16-paĝa broŝuro *Oppdag esperanto*, tradukita norvegen de Hilde Dahlberg, Douglas Draper kaj Marianne Lund, kaj pagita de NEL, NJE kaj pluraj kluboj kune. Aperis ankaŭ flugfolietoj en formato de vizitkarto. Aldone la pdf-dosiero de la broŝuro estas elŝutebla el nia retpaĝaro.

Informpetoj

Venis manpleno da informpetoj dum 2012, kaj rete kaj ĉe porde en la oficejo en Oslo.

B. Instruado

Ĉeestaj kursoj

La estraro ĉiujare instigas, kaj se necese helpas plifaciligi, ankaŭ ekonomie, ke lokaj kluboj aranĝu kursojn por novuloj.

En novembro okazis trihora kurso por unu persono en Tromsø. Ankaŭ en la printempo okazis kelkaj kursoj tie. Aliaj kluboj ne raportis pri kurso.

Interretaj kursoj

La estraro prioritatas, ke vizitantoj al niaj retpaĝoj facile trovu atkvalitajn interretajn esperantokursojn.

En la TTT-ejo estas ligiloj al la plej aktualaj kursoj. Pluraj membroj de NEL aktivis pri kursoj kiel lernu.net, sed la estraro mem ne okupiĝis pri la afero.

Hilde Dahlberg en la jubilea grupo starigis 125-tagan kurson de Esperanto per Twitter ĝis la jubilea tago en julio (@Eo125kurs). Ĉiu mesaĝo en Twitter povas havi maksimume 140 signojn (literojn kaj interspacojn sume). Aperis tie kaj ĉiutagaj lecionetoj kaj aliaj amuzaĵoj kaj ligiloj. La kurso ripetiĝis poste. Je la jarŝanĝo la kurso havis 94 abonantojn, inter ili ankaŭ kelkaj esperantistoj kiuj de tempo al tempo «plukvivitis» mesaĝojn al siaj propraj abonantoj.

Al plenumintoj de kursoj la retpaĝoj de NEL atentigas pri la konstanta oferto de la legaco Uhlen pri subvencio al junuloj por ilia unua internacia Esperantaranĝo. Kursanoj konataj al ni ricevu ankaŭ oferton pri membreco.

Ankaŭ en 2012 NEL ne ofertis akompananton, sed la legaco Uhlen

daŭre havas paĝon en nia retejo.

Ekzamenoj

La Ekzamena Komisiono konsistas el Otto Prytz (prezidanto), Gunleik Berg-rud kaj Karl Johan Grønning. La komisiono ne aktivis en 2012. Per ligo en la hejmpaĝo de NEL estas rete konsulteblaj: la ekzamena regularo, la programo por la Elementa Ekzameno, kaj la programo por la Meza Ekzameno.

Instruantoj

La estraro prioritatas subtenon al membroj kiuj deziras lerni instruadon de Esperanto.

La estraro ne ricevis petojn dum 2012.

Faksekcio de instruistoj

La faksekcio ankoraŭ dormas. La peradon de la norvegaj ILEI-kotizoj kaj la mastrumadon de la konto de la instruista sekcio prizorgas la kasisto de NEL, Anne Karin Bondhus. En 2012 la estraro decidis ne formale malfondi ĝin, okaze de tio ke ĝi iam reviviĝos

Lernolibro

Dum 2012 eldoniĝis la lernolibro *Esperanto – den direkte metoden*. Ĝin tradukis norvegen Bjørn Kristansen Øyen, kaj ĝin eldonis (200 ekz.) li kaj Anne Karin Bondhus.

C. Kontakto kun la kluboj kaj membroj

Kluboj

La estraro tenas kontakton kun la kluboj kaj ofertas/interŝanĝigas ideojn por ilia aktivado.

La estraro esploras la eblecon oferti specialajn favorojn al la membroj.

Tiuj taskoj ne prioritatiĝis dum 2012.

Seminario por membroj

La estraro laŭeble aranĝu seminarion por la membroj dum jaroj kiam ne okazas landa kongreso.

La seminario por 2012 prokrastiĝis ĝis februaro 2013.

Norvega Esperantisto

La estraro prioritatas labori por

- eldonadi *Norvega Esperantisto*

Ankaŭ dum 2012 nia membrogazeto *Norvega Esperantisto* donadis al la membroj la plej gravajn informojn. La jarkolekto 2012 konsistis el 6 numeroj, kvar havis 16 paĝojn, unu havis 28 kaj unu havis 20. Redaktis Douglas Draper; enpaĝigis Douglas Draper kaj Judith Parelle Abrahamsen (bildojn kaj *Inter Ni Dirite*); presis Øien & Indergaard, Trondheim.

Krom al la membroj ni sendis *Norvega Esperantisto* al 4 (2) norvegaj kaj 4 (4) eksterlandaj pagantaj abonantoj, 2 (1) norvegaj kaj 12 (13) eksterlandaj donacabonantoj, ni sendis ĝin senpage al 4 (4) norvegaj kaj 25 (25) eksterlandaj ricevantoj, kaj interŝanĝe al 16 (16) eksterlandaj eldonantoj de Esperantaj periodaĵoj. Ni sendis la gazeton papere kaj senpage nur al la najbaraj landaj asocioj kaj al tiuj de kelkaj malriĉaj landoj.

Retlistoj

- teni la retoŝtlistojn *NEL-diskut* kaj *NEL-inform* aktivaj

La retoŝtliston por membroj, *NEL-inform*, administris Jardar E. Abrahamsen tra servilo ĉe *Nettverksgrappa*. Per

ĝi estas atingeblaj 56 membroj (61), kaj sendiĝis 108 (132) mesaĝoj.

La diskutliston NEL-diskut, malferman por ĉiuj, administris Jardar Eggesbø Abrahamsen. Sendiĝis 37 (5) mesaĝoj.

Raportoj kaj cirkuleroj

- postuli jarraportojn de la lokaj societoj

Laŭstatutajn jarraportojn pri 2012 sendis la kluboj de Hamar, Oslo, Tromsø kaj Trondheim.

Nur Oslo eldonas propran kluban bultenon. La kluboj de Oslo, Sarpsborg, Stavanger, Trondheim kaj Tromsø havas retpaĝojn en TTT.

La klubo de Hamar kunvenis kvinfoje en 2012.

La klubo de Oslo kunvenis proksimume ĉiun duan semajnon krom en feriaj periodoj, kun 3–11 ĉeestantoj, averaĝe 5,5. Kiel ŝtatan subvencion la klubo ricevis 3660 kr tra la studasocio *Næring og samfunn*.

La klubo en Tromsø kunvenis 9-foje dum la jaro, i.a. pro vizito de gastoj. Klubanoj ankaŭ partoprenis la procesion la 17-an de majo. La klubo partoprenis konkurson en Facebook, kie la banko *Sparebank1 Nord-Norge* disdonis monon al organizoj en la regiono. La klubo ricevis 114 voĉojn kaj ricevis 1140 kronojn de la banko.

Grupo Esperantista de Trondheim kunvenis ordinare 15-foje kaj krome okazis jarkunveno kaj du festoj. En la

ordinaraj klubkunvenoj partoprenis 4–10 membroj, averaĝe 6,9. La klubo membras en *Grasrotandelen*, kaj ricevis de *Norsk tipping* 1816 kronojn dum la jaro. Tra la studasocio *Næring og samfunn* la klubo ricevis 3790 kr.

La aliaj kluboj ne raportis formale, sed ni informiĝis ke la klubo de Bryne kunvenis unu fojon monate, kaj ankaŭ vizitis Parizon kune.

La Esperantoklubo de Bergen ankaŭ en 2012 ne kapablis havi ordinarajn kunvenojn. Tamen kelkaj membroj de la klubo neformale renkontiĝis dum la jaro.

- informi la membrojn pri la agado de la estraro

La estraraj protokoloj afiŝiĝis en niaj retpaĝoj, kaj la membrogazeto peris la plej gravajn punktojn.

Ĉ. Aliaj projektoj kaj aplikoj

Vortara projekto

La estraro prioritatas havigi monon por akceli pluevoluigon de la vortara datumbazo.

Kiel raportite en la jarraporto por 2011, la nova materialo por la vortaro estas netaŭga. Interalie tiu materialo estas kolektita laŭ inversa metodo, kio rezultigas ke unuflanke mankas multaj

kutimaj norvegaj vortoj, aliflanke estas tie multaj strangaj Esperantaj vortoj. La vortaro origine estas projekto de Grupo Esperantista de Trondheim. NEL petis GET doni siajn konsilojn.

Turismo

Cato Haugen en Oslo estas nun rajtigita ĉiĉerono.

D. Administrado

Retservilo

La retservilon formale posedas Akademisk esperanto-forum en Trondheim, kaj ĝi situas en la oficejo de Jardar Eggesbø Abrahamsen, kiu ĝin administras. Lia poŝtelefono ricevas tekst-mesaĝon je problemoj pro retkonekto.

Ankaŭ en 2012 oni devis dufoje forŝalti la servilon pro planita forŝalto de elektro en la domo kie situas la servilo.

Judith P. Abrahamsen plulaboris pri la starigo de nova retpaĝaro en servilo ĉe la firmao Initio Medielab (Trondheim).

La servilo kaj tehnikaj solvoj tie estos pli modernaj. Laŭ la plano la nova paĝaro lanĉiĝu dum la landa seminario en februaro 2013, dum la retpoŝta sistemo transiros poste.

La oficejo

En la oficejo en Oslo deĵoris ĉefe Douglas Draper, kiu ankaŭ respondecis pri arĥivado.

La estraranoj troviĝas tra la tuta lando, kaj preskaŭ la tuta komunikado inter ili okazis per Interreto.

Teknikaĵoj

Herman Raner en Trondheim asistis la oficejon en Oslo pri komputilaj kaj telefonaj praktikajĵoj.

La Esperanto-Domo (Esperantonia)

NEL posedas duonon de Esperantonia, kaj la Oslo-klubo posedas same multe. La posedantoj dividas inter si la loĝkostojn. Ekde 2008 la Oslo-klubo ricevas 60 % el la luig-enspezoj.

Membrostatistiko por NEL en 2012

En 2012 NEL havis 8 aliĝintajn klubojn. La membronombroj estis en 2012 (2011):

Bergen	12	(13)
Bryne	8	(9)
Hamar	3	(3)
Oslo	57	(64)
Sarpsborg	6	(6)
Stavanger	6	(6)
Tromsø	18	(19)
<u>Trondheim</u>	<u>15</u>	<u>(17)</u>
Kluboj sume	125	(137)
<u>Rektaj</u>	<u>27</u>	<u>(30)</u>
Membroj entute	152	(167)

Eliris 17 (20) membroj kaj mortis 4 (2) membroj. Ni ekhavis 2 (3) novajn membrojn, kaj 3 (3) malnovaj membroj remembris.

Membroj laŭ kategorioj:

Klubanoj:

Ordinaraj	73	(88)
Junulaj	18	(18)
Samdomaj	9	(9)
Dumvivaj	24	(21)

Rektaj:

Ordinaraj	20	(24)
Junulaj	3	(2)
Samdomaj	0	(0)
Dumvivaj	4	(4)

Ekonomio

En 2012 la ĉefkalkulo de NEL montris malprofiton de 4221 kr. Sen pago de 2 dumvivaj kotizoj la malprofito estus 9361, pro la diferenco (5140 kr) inter du ordinaraj kotizoj kaj du dumvivaj kotizoj. Tamen atentu ke tiuj du dumvivaj kotizoj estas en realo antaŭpago de ontaj kotizoj, kaj do ne vera enspezo en 2012.

La elspezoj en 2012 estis preskaŭ la samaj kiel en 2011 (kaj en 2010), ĉirkaŭ 44000 kr. Sed en 2012 la enspezoj estis malpli grandaj. La kaŭzo de tio estas parte ke la membraro malkreskis de 167 membroj en 2011 al 152 membroj en 2012. Tio donas proksimume 3700 kr malpli. Aldone, iuj membrotizoj por 2012 estis registritaj en la jarkalkulo de 2011, kaj tial la membrotizoj en 2011 estas pli grandaj ol en 2012.

En 2011 ni havis ankaŭ 4000 kr pli kiel diversajn enspezojn pro vendo de la libro *Lingvaj Paĝoj* kaj pro malfondo de la esperantoklubo en Kristiansand.

NEL ricevis 2170 kr donace al la ĉefkalkulo en 2012, kaj 6000 kr donace al la domkonto.

Aldone ni presis la 16-paĝan koloran broŝuron *Oppdag esperanto* kun subteno de la esperantokluboj en Oslo,

Bergen, Trondheim kaj Tromsø, kaj de la esperantojunularo. Ĉiu subtenanto donis 770 kr, dum NEL pagis 989 kr. Kostis 4839 kr presi ĝin en Slovakio kaj transporti ĝin al Norvegio. Ni kore dankas pro ĉiuj donacoj kaj subtenoj!

En 2011 NEL ricevis donacojn al la propaganda fondaĵo ankaŭ por pli malgranda ĝenerala broŝuro por disdonado surstrate kaj en aliaj lokoj kiel reklamado por esperanto.

Tiu broŝuro ne estis eldonata en 2012, ĉar ni anstataŭe prioritatis fari novajn retpaĝojn de NEL.

En 2012 la solaj luenspezoj por nia ejo Esperantonia estis pro kunvenoj de kunposedantoj de la najbaraj domoj, entute 3700 kr. La enspezoj pro luigo estas distribuataj per 60% al la Oslo-klubo kaj 40% al NEL, kio en 2012 donis 2580 kr al la Oslo-klubo kaj 1720 kr al NEL. Tiu distribuo estas ĉar la Oslo-klubo havas la praktikan laboron rilate al la luigo de la ejo.

En 2012 la gajno de la domkonto estis 8554 kr, sed tiu sumo inkluzivas donacojn de 6000 kr, kaj en 2012 estis neniuj eksterordinaraj elspezoj por la ejo. La longdaŭra bilanco de la domkonto do estas nur iom pli ol nulo, ĉar ni bezonos monon ankaŭ por venonta renovigo de la ejo. Kiel en 2011 la domluo de kaj NEL kaj la Oslo-klubo estis po 15200 kr. Ĉar nek NEL nek la Oslo-klubo havas ekonomion por kreskanta domluo, gravas trovi novajn luontojn por la ejo.

La valoro de niaj investoj en Skagen-fondene kreskis. La valoro de Skagen Vekst kreskis per 2908 kr, kaj la valoro de Skagen Høyrente kreskis per 2167 kr. La bankkontoj donis interezon de 211 kr. Entute estis kresko de 5285 kr.

Ĉar Skagen Vekst malkreskis per 7581 kr en 2011, tamen estis granda malgajno en Skagen Vekst por la jaroj 2011 kaj 2012 sume.

Proksimume 1/6 el la kresko en 2012 estis transigita al la propaganda fondaĵo, 1/6 al la instrua fondaĵo, 1/4 al la domkonto kaj la resto al la ĉefkalkulo de NEL.

Legaco Rolf Uhlen

De la komenco la legacon administris NEL kaj Norvega Esperantista Fervoja Asocio (NEFA) kunlabore. La reprezentantoj de NEL en la legaca estraro dum 2012 estis Torstein Kvakland kaj Arne Olav Mjøen, kun anstataŭantoj resp. Judith Parelle Abrahamsen kaj Helge Knudsen.

Norvega Junularo Esperantista

La estraro de NJE estas:

- prezidanto: Leif Arne Storset
- vicprezidanto: Amelie Matt
- sekretario: Einar Faanes
- kasisto: Hilde Lagnason Bye
- estrarano: Kristoffer Haug

La estraro nomumis Hilde Lagnason Bye kiel komitatanon A por TEJO, ĝis la venonta elekto en 2014. NJE aranĝis *Nordluman renkontiĝon* apud Tromsø en februaro, kun 12 partoprenantoj precipe el Norvegio kaj Finnlando, sed

ankaŭ el Britio kaj Svedio. NJE aranĝis kabanumadon en Østfold en aŭgusto/septembro, kun 8 partoprenantoj el Norvegio, Britio, Hispanio, Germanio kaj Svedio. Mojosa vespero, iniciatita en 2011 kiel libertema renkontiĝo hejme ĉe membro kaj en Skype, okazis okfoje dum 2012, kutime kun 3–5 partoprenantoj.

Biblioteko

Centra responsulo pri la biblioteko estas Douglas Draper. En 2010 po unu ekz. de preskaŭ ĉiuj libroj (de norvegaj 3, de nordiaj 2) estis forsenditaj al la Nacia Biblioteko (la deponejo) en Mo i Rana, kie ili iom post iom katalogiĝas kaj estas senpage prunteblaj per ajna loka biblioteko. La restantaj duoblaĵoj trovis lokon en Esperantonia, kie ili enbretiĝis en la kunvenĉambro komence de 2012. Ankaŭ la plejmulto de nia granda kolekto da eksterlandaj periodaĵoj estas (pli frue) forsendita al la Nacia Biblioteko, sed mankhavaj jarkolektoj kaj tiuj de la lastaj dek jaroj restas malsupre en Esperantonia.

Studenta Esperantosocieto

NEL kaj la Studenta Esperantosocieto (en Oslo) daŭre havas bonajn rilatojn.

Kunlaboro kun NEFA

Norvega Esperantista Fervojiista Asocio (NEFA) kaj NEL kunlabore administris la Legacon Rolf Uhlen dum multaj jaroj.

Internacia organizo

Komitatano A de UEA estis Torstein Kvakland. Li sekvas la diskutojn en la

komitata retpoŝta listo kaj en nia propra estrara listo.

Ĉefdelegito de UEA estis Agnar Fitjar. Li peris informon de UEA pri 34 membroj de NEL kiuj estis individuaj membroj de UEA en 2012 (45 en 2011, sed 33 en 2010), laŭ kategorioj jenaj:

Membro-Abonanto	15
Membro kun Jarlibro	9
Membro kun Gvidlibro	1
Membro kun Jarlibro TEJO	1
Dumviva Membro	7
Dumviva Membro kun Jarlibro	1

Universala Kongreso

2 norvegoj aliĝis al la UK en Hanojo (2011 en Kopenhago: 24).

Kunlaboro kun ne-Esperantaj organizoj

Dum 2012 NEL estis membro de la studasocio *Næring og samfunn*, kiu estas kunfando de *Populus – studieforbundet folkeopplysning* (kie ni membris ĝis 2012) kaj *Bygdefolkets studieforbund*. En la jarkunveno reprezentis NEL-on Douglas Draper.

La estraro de NEL dum 2012

- prezidanto: Jardar Eggesbø Abrahamsen
- vicprezidanto: Ulf Chr. Lunde
- sekretario: Ingebjørg Rambjør
- kasisto: Anne Karin Bondhus
- estrarano: Mario Machlik
- estrarano: Asbjørn Lindh
- anstataŭanto 1: Eli Eriksen Fitjar
- anstataŭanto 2: Arne Olav Mjøen

E. Konkludo

En 2002 NEL havis 252 membrojn. En 2012 ni havis 152. Dum dek jaroj ni perdis kvar dekonojn de nia membraro. Tio en la longa daŭro donos timigan situacion. La kaŭzoj de la malkreskanta membraro estas pluraj, interalie la alta averaĝa aĝo. Sed la redukto ankaŭ ŝuldiĝas al malbona alfluo de novaj membroj kaj problemoj teni multajn el tiuj kiuj alvenas. Oni ne bezonas klubojn aŭ ĉeestajn kursojn por lerni Esperanton. Tio estas unuflanke bona afero, Esperanto-kursoj estas pli facile alireblaj ol antaŭe. Aliflanke lernintoj ne necese sentas la saman identiĝon kun la lingvokomunumo, kiun oni pli facile ekhavas dum ĉeestaj kursoj kaj vizitoj en kluboj. Do pli da lernantoj ne necese donas pli da membroj.

Sed malgraŭ la severa situacio okazis ankaŭ io nova: Manpleno da membroj pro propra iniciato formis grupon kaj kunagis, esence per Interreto: Finfine eldoniĝis nova broŝuro, okazis kurseto per Twitter, stariĝis jubilea paĝaro en Interreto, kaj dissendiĝis multaj gazetaraj komunikoj. Kaj en kelkaj kluboj estis, kiel antaŭe, vigla aktivado. Tiuj okazaĵoj ne necese donas subitan alfluson de novaj membroj, sed la aferoj helpas al la ĝenerala videbligo de la lingvo, kio estas necesa kondiĉo.

La membrogazeto daŭre estas altkvalita kaj aperadas regule, kio estas laŭdinda atingo por tiom malgranda organizo. La preparoj de la nova retpaĝaro progresis kun planita lanĉo en februaro 2013, dum la vortara laboro daŭre stagnas.

Ni ne atendu subitajn miraklojn, ĉar estas spirala rondiro inter la membrara malkresko kaj la laborkapacito de la organizo. Tamen povas esti ke unu paŝo sur la longa vojo el tiu spiralo estas ĝuste la novaj ideoj kaj laborformoj inter aktivuloj kiuj havas la kapaciton fari praktikan laboron. La estraro nepre donu siajn administrajn servojn al tia laboro kiam ajn necese.

La 31an de decembro 2012/ la 4an de majo 2013.

La Liga Estraro

Jardar Eggesbø Abrahamsen

Ulf Chr. Lunde Anne Karin Bondhus

Ingebjørg Rambjør Mario Machlik Asbjørn Lindh

Eli Eriksen Fiŝjar Arne Olav Mjøyen